

BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

Enhavo:

Dora Gabe — Peneva: La steloj, tr. A. Grigorov.

Penčo Slavejkov: El „Revo je feliĉo“, tr. D. Zlatarski.

Hristo Jasenov: Pogromo, tr. A. Lakov.

Teodor Trajanov: Magiisto, tr. K. de Kalocsay.

Atanas Dalĉev: La maljunaj fraŭlinoj, tr. A. Grigorov.

Emanuil P. Dimitrov: Tataroj, tr. A. Grigorov.

Hristo Kazanĝiev: En la stepo, tr. Geo V.

Dim. Borisov: Unu sugesto.

Ada: Inter ni.

Enlanda Esperanto - movado; Bibliografio.



Bibliografio

Libroj

Deklaracio pri la vero elmontrata laŭ la sankta biblio. Kun elĉerpaĵoj el la sanktaj libroj. Dua eldono, malgranda formato. 51 p., senpage havebla ĉe: Sro G. K. Martin, 43 Calmont Road, Bromley, Kent, Anglujo.

Organiza centra komitato de la esperanto-movado. Organiza statutaro. Genève, 12, Boulevard du Théâtre, 1925. Malgr. formato, 31 p., prezo nemontrita.

Iv. Iv. Gorbunov—Posadov. Lev Tolstoj kaj la universala vero, el la rusa trad. Asen Grigorov. Posrednik, Sofia, Esperanto-fako № 1. Malgr. formato, 32 p., prezo 4 levoj.

Informilo por junaj esperantistoj. Eldono de Esperantista Junularo, A Neupert, Leipzig—Möckern, Wedellstrasse 17 (Germ.) Malgr. formato, 48 p., prezo 0.125 Sm. = 0.25 germ. mk.

William Morrisson. The object lesson, 3-akta komedio en angla lingvo. Eld. Brita Esperanto—Asocio, London. Malgr. formato, 20 p., prezo nemontrita.

Internacia centra komitato de la e.-movado. Deksepa Universala kongreso de Esperanto. Esperantista dokumentaro. Genève, 12 Boulevard du Théâtre (Svislando). Ordinara formato. 48 p., prezo nemontrita.

Gazetoj

Internacia Stenografisto, Febr.

Internacia Medicina Revuo, Jan., 1926. — Impona scienca revuo.

La Fervojisto, Nov.—Dec. 1925.

Novaj Tempoj, Nov., Dec. 1925.

Libero, Jan., Febr., 1926. Al tiu revuo unuiĝis kaj ne plu aparte aperos Vegetarano, la konata revuo, por koncentri la fortojn de la esperantistoj.

La kolportisto, № № 1 kaj 2, 1926. Aperas pli plaĉe.

Literatura Mondo. № 8 enhavas: E Wilde — La milito en Mahtra; Julio Baghy — Viktimoj (romano), La polvohomo meditas; Joan Arus — La deziro, La amikino en preĝejo; Joseph Reisinger — En silenta la soleco; Raymond Schwartz — La pipo de Prosper; R. Munoz Seca — Sunaj horoj; Pol de Mont — Idilio, La aĵoj, kiujn donis mi; St. Zausmer — Nokto; B. Benetka — Vlastimil Rada; Observo; Emma L. Osmond — Pensoj pri Shakespeare. Bibliografio k. a.

№ 9. enhavas: Ivan Franko — Mia krimo. J. Baghy — Viktimoj; Johan Liiv — Poemoj; Julio Pekár — Pierrot kaj Colombine; Julio Baghy — Legendo, Mia reĵlando; Charles Baudelaire — Moesta et Errabunda; Hasse Zetterström — Papersaketo da sukeraĵoj; R. Schwartz — La vunda punkto; P. Varsanyi — Ladislao de Paal; Observo k. a.

(Sekvas sur p. 3)

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO :
por Bulgario
40 levoj,
por alilando
2.50 sv. fr.
au egalvaloro

MONATA ORGANO
DE LA BULGARA ESPERANTISTA
SOCIETO

Adreso
de la Redakcio
kaj administracio :
Sofia (Bulgario),
strato Car Boris, 69

Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado por la lernejoj-bibliotekoj
per cirkulero № 1870 de 27. januaro 1922

Dora Gabe — Peneva

La steloj

Morgaŭ estas festo. Onnjo Vasilica diris : Pentekosto. Tial ĉe ŝi la tuta domo estas surŝutita per herboj kaj timianoj. Sur la muroj kaj sur la ikonoj. La lucerno lumas, kaj la ikonoj kvazaŭ estas el suno. Kiam ili ekbrilis tuj la sankta Dipatrino ridis kaj la eta Jezuo ridis kaj rigardis rekte en miaj okuloj. La bona Jezuo, kiu preĝis al Dio ke li por nenio al ni koleru...

Kiam morgaŭ estas festo, ĉio iĝas alieca. La preĝsonorilo de la apuda vilaĝo tre longe sonoradis kaj ĉiuj frue rehejmiĝis de la grenkamparo.

La fojno de tiu amaso estas freŝa kaj de tie ĉi estas videbla la apero de la steloj... Dio ilin ĉiujn lumigos, ĉar morgaŭ estas festo.

La tintiloj kaj la ŝalmoj sin miksis kaj jam iĝis mallume.

— Kial unuj steloj estas grandaj, kaj aliaj etaj?

— Unuj staras proksime, kaj la aliaj malproksime.

— Kiel do?

— Ja tiel!

Se oni sidas sur la fojno, la ĉielo estas pli proksima. Kaj kiam ĝi blankiĝas de unu rando ĝis la alia, fariĝas lakta vojo.

— Kiu marŝas do sur la lakta vojo?

— Kiu povus marŝi, la steloj!

Panjo diris, ke ili estas infanoj. Mortinte, ili iras tien. Kaj jen estas iliaj okuloj.

— Kiom multe da infanoj mortis!

— Kie?

— Sur la ĉielo.

— Tio ne estas infanoj, ĝi estas sunoj kaj teroj...

— Teoj...

Jam estas tute mallume kaj la griloj ĉirpas...

— Ĉu vi vidas tie la grandan stelon?

— Kie?

— Jen tie, ĉe tiuj tri — jen ĉi tie — jen.

— Mi vidas.

— Ĝi estas ankoraŭ unu stelo.

— Kaj pro kio ĝi lumas?

— Suno ĝin lumigas.

— Kia eta tero! Kia guteto! Ja kiamaniere oni povus marŝi sur ĝi!

Miaj palpebroj tremetas kaj la astroj tremetas kaj de la griloj la kantado tremetas...

Kiel mirinda estas ĉi tiu stelo!

— Ĉu estas vojo al la stelo?

— Komprenoble.

— Kaj ĉu estas malproksime?

— Dum oni ĝin atingas, oni maljuniĝas.

Ja kiom ĝi estas — oni maljuniĝas...

— Kiu diris al vi?

— La instruisto.

Tiel eta tero, kaj ĝia vojo longa. Ne komprenoble estas kiom longa ĝi estas.

— Kaj ĉu ĝis la aliaj astroj la vojo estas malproksima?

— Kiel ĝis la jena.

— !!

— Kaj de unu stelo ĝis la alia estas samtiel malproksime.

— Kaj kiel ili povas enteniĝi en la ĉielo?

— Vi vidas ke ili enteniĝas.

Nenio estas komprenbla. Sur la ĉielo ĉiam vojoj. De unu stelo ĝis la alia estas malplenaĵo! Kie sidas Dio! Kie sidas la anĝeloj, la sanktuloj, kaj la animoj? Kaj pro kio la steloj ŝajnas esti unu apud la alia, se ili troviĝas tiom malproksime.

Ja ĉu tio estas sunoj kaj teroj!

— Kaj la luno?

— Ĝi estas mortinta tero!

— Kiel mortinta...

— Frostiĝinta. Tial ĝi estas blanka.

Kiel terure, ke la luno formortis! La kompatinda luno. Sufozeble ankaŭ la anĝeloj sur ĝi mortis for.

— Kie ĝi nun estas?

— Sur la alia flanko de la tero.

— Kie ĝi staras?

— Tie ankaŭ estas ĉielo kaj steloj.

La fojnamaso sub ni ekbalanciĝas. Samkiel, se mi rigardus akvon kaj ene vidiĝus la ĉielo.

— Ĉu la tero ne estas apogita?

— Ne estas.

Kial panjo al ni ne diris, ke ni povus fali! Kiel terure, ke sub la tero estas malplenaĵo! Pro kio ĉio balanciĝas!

— Aj!

— Stelo falis! Ĉu vi vidis! Tuta tero falis.

— Ĉu ĝi povas frakasi nin?

— Kompreneble.

Mi volas iri al panjo! Ne estas bele ke ekzistas ĉielo. Mi me volas ĉielon.

— Kaj ĉu vi scias, ke la tero sin turnas!

— Kial?

— Tia ĝi naskiĝis. Tage ni estas kun la kapo supren, kaj nokte kun la kapo malsupren.

Mia frato saltis kaj kuregis hejmen. La ĉielo kliniĝis kaj ĉiuj steloj kliniĝis. La tero sin levas per unu rando kaj ektur-niĝas, ankaŭ la fojnamaso turniĝas. Mi falas — la manoj de panjo etendiĝas kaj prenas min. Panjo min portas hejmen. La domo balanciĝas kaj la glaso en mia mano balanciĝas. Mi ne trinkemas.

— Kial ĉio estas alia!

— Kio?

— La ĉielo kaj la steloj?

— Ĉar morgaŭ estas festo.

— Ah, panjeto, kial la steloj estas tiel fore, kaj tamen staras proksime! . . .

— Kiam vi iĝos grandaĵa, vi komprenos.

Panjo enverŝas teon kaj ne volas paroli. Paĉjo legas gazeton. Mia frato tre rapide manĝas kaj ĉiam rigardas en la teleron.

— Panjeto, kaj se turniĝas la tero, ni ja falos?

Paĉjo levas la kapon kaj rigardas. Mia frato manĝas ankoraŭ pli rapide.

— Ni ne falos. Dio nin gardas.

Paĉjo stariĝis.

— Kiu plenigis al ŝi la kapon?

Mia frato manĝegas, paĉjo tiris liajn orelojn.

— Ĉu ne la steloj frakasos nin kiam ili falos?

— Ili falas preter la teron, ĉar la malolenaĵo estas granda.

— Ah panjeto, kiel malfa ile oni povas kompreni! . . . Se la steloj estas fore, la vojo estas ja granda, ja ankaŭ ĉio estas granda — kial oni ne povas kompreni kiom ĝi estas granda?

— Atendu ĝis kiam vi plenkreskos.

Kiel strange, ke nun oni ne devas kompreni. Jen estas paĉjo, kaj panjo, kaj mia frato, kaj la frateto, kaj la fratineteto. Kiel facile estas, ke ili estas. Ekstere estas la ĉielo kaj la steloj, kaj Dio, kaj la vojoj, kaj la malpleno, kaj oni ne povas kompreni kio estas . . .

— Kiamaniere Dio lumigas la stelojn, se ili estas tiom fore?

— Dio estas pli granda ol ĉio.

— Kiom granda?

— Plej granda. Ol ĉio plej granda!

Nenion oni povas kompreni!

Panjo fermis la fenestron. Tra la vitro videblas nur unu steleto. Kiom ĝi estas fore! . . .

Antaŭ ol atingi ĝin mi iĝos maljuna, maljuna. . .

Trad. A. Grigorov

BULGARA ANTOLOGIO

Penĉo Slavejkov

REVO JE FELIĈO

1. Sur mia frunt ne plektas sin de l'laŭr'
malmolaj pezodoraj la folioj;
sur fremdaj favaj velku ĝi kranioj
por kaŝi ilin de la sun' en daŭr'.

Alia floro plaĉas al la kor'
Salute l'amikin ĉiumatene
ornamas min per tiu bela flor' —
la violeto rosa aromplena.

2. La koro mia fremdas de la mond',
de templ' antikva kiel ruinaĵ,
kaj la sekretojn ĝi ĵaluze kaŝas
en la sankteĵ' de sia profundaĵ'.

Atendas ĝi alvenon de ia mort',
de templ' antikva kiel ruinaĵ . . .
Mondbru' en tiun templon ne enpaŝas
por ĝin makuli per abomenaĵ'.

3. Sekaĵn la aŭtuna vent'
flavajn folietojn ŝiras —
mi prujnitajn folietojn
piedĉifas kaj foriras.

Kion flustras inter si,
mi ne scias tion nune —
mi ekscios kiam same
tuŝos min la vent' aŭtuna.

4. Silenta nokto mondon kovras
per sia nigra la kovril',
nur mia revo tie vagas —
en la mallumo sen trankvil'.

Senhejme vagas ĝi, naskita
de l'tagoj en la senhejmec' —
kaj kontraŭ ĝi malfermas faŭkon
el la mallumoj la solec'.

5. De vi lasita flora la buked'
 ĉambreton mian per arom' plenigas,
 animon mian tiu belarom'
 pri vi, infano kara, enrevigas.

Mi vidas vin de revoj en l'arom,
 al mi la pensoj viaj same kuras . . .
 De vi lasita flora la buked'
 ĉambreton mian per arom' saturas.

6. Trafis nin malbona sorto.
 Unu de alia for —
 vi en sudo, mi en nordo,
 en sol' enuas kor' pri kor'.

Tagoj pasas, alternantaj . . .
 ĉu revata venos tag'
 por la koroj konfesantaj
 la amon nur en la imag'?

Trad. Dimitr Zlatarski

Hristo Jasenov

POGROMO

Oraŭtuno orfoliojn sternas,
 en purpur sin banas arbokron;
 malĝojegoj mian bruston premas
 jam ruino iĝas mia tron.

Pluve alblovante sonĝfantomojn,
 etaj gutoj falas ja sen fin' . . .

Mi laciĝis jame de pogromoj! —
 Kara panjo, ĉu vi aŭdas min?

Sternas la vesper' mallumajn ombrojn,
 ĝi la kampojn tegas per malbril.

Mi forgesis amon kaj kuraĝon,
 malle vite pendas la flugil,

kaj perdinte vojon kaj direkton,
 senrifuĝe en la monda lim

mi forbrulas sola kaj silenta! —
 Kara panjo, ĉu vi aŭdas min?

Tra la poploj turnovento fajfas
 sekfoliojn forigante — jen

super mondo mev' timema ploras,
 kaj aŭdebla estas branĉoĝem',

kaj — teginte spacojn kaj vastaĵojn —
 sonĝsolecojn ijam flirtigas Di' . . .

Ĉu en mi kantas kaj preĝadas . . .
 Kara panjo, ĉu vi aŭdas lin?

Trad. Atanas Lakov

Teodor Trajanov

MAGIISTO^{*)}

En blu-krepusko, fore, ekdronas blank-konstruoj,
Kaj fremdas mi je ĉio, je ĉiu tempo, dom.
Forgesis pri l'malbonoj, forgesis mi pri ĝuoj,
sed kara al mi ĉio, eĉ lasta la atom.

Sed la aferoj mutas; nenion ja perfidis
el sia dua senco, mistera kaŭvizaj.
Mi okulstreĉis — kaj mi ŝlositajn pordojn vidis,
la fortikajon rompis nek psalmoj, nek kuraĵ.

Tutpova magiisto, rebril fatamorgana
de l'noktomez — mi iras: profet de l'stelofaloj.
Vidtrompojn lumajn vekas mi en la kor malsana.

Sed ofte haltas mi sur fora tomb matene,
el ĉiuj plej malriĉa! kaj pie el petaloj
de mia roz unua kolektas mi ĉagrene.

Trad. K. de Kalocsay

Atanas Dalčev

LA MALJUNAJ FRAŬINOJ

Leĵere sin la manoj movas kaj kantas la malnova rad,
tra sekaj, tra maldikaj fingroj, sin tordas el la silk fadenoj,
radioj kvazaŭ trapenetris tra branĉoj nokte la malplenojn —
maljunaj inoj apatie en rondo ŝpinas ĉe la rad.

Kaj sen parol kaj sen demandoj silentas ili ĉiam kaj
sen ĉes la radon turnas, turnas, — aŭskultas ĝian vean kanton,
de la maten en frostaj ĉambroj sur la ŝpinilo sin klinante,
kaj jen — sur la fenestroj jame la tag forbrulas kun malgaj.

Ho, la fraŭlinoj, la maljunaj atendas pri l'vespera hor
por elripozi fine sonĝe kaj ŝpini morgaŭ diligente!
Riĉaĵon solan ili havas: ĝi estas la harar arĝenta,
kaj en iliaj koroj — vazoj — ekfloras floroj de dolor.

Ja kion volas la fraŭlinoj? Esper ĉu restis en la kor?
Aŭ ili devos jam pereji ne gustuminte de la amo?
Ah! la fraŭlinoj, la maljunaj atendas la novedzon jame,
— la edzo lasta ke aliru kaj ŝiru la fadenon for!

Trad. Asen Grigorov

*) La jenan versaĵon ni represas el la „Bulgara Antologio“ de Ivan
Krestanov.

R. e. d.

Tataroj

Emmanuel P. Dimitrov

Tio-ĉi okazis en urbo de Svisio, la lando de l'homecaj moroj, dum somera nokto, inter studentoj — medicinistoj, en trankvila ĉambro, ĉe la lumo de rozkolora lampŝirmilo. Manoj de ino per facila tuŝo elvokis el la piano revigantajn akordojn. La studentoj fumis, ridis. Ili parolis pri la rusa vivo. La nigrohaŭta gruzo Emeljan plenigis sian pipon per tabako el flaviĝinta homkranio, servanta al li samtempe ankaŭ por anatomi-studoj. Li estis rakontanta ion el la vivo de l'tataroj. La eta Mary provoke ridetis.

— La jeno okazis dum la tempo, kiam Nikolao la Unua deprenis parton post parto de la Kaŭkaza regiono. Rusa roto estis sendita al la limo por persekuti tatarojn, kontrabandistojn de armiloj. La soldatoj, ne povinte malkovri iliajn postsignojn, arestis pro suspekto kelke da homoj el la apudaj kabanoj sur la monto. La arbarloĝantojn oni ligis kaj kondukis en la proksiman vilaĝon, kie oni ilin ĵuĝesploris per la helpo de interpretisto kaj resendis denove, kun nomaro kaj gardsoldatoj, al la regionestro ĉe la limo. Tie oni malliberigis ilin en malaltan subterejon, similtantan al kelo, kun mallarĝa fenestreto. Inter la kaptitoj estis du samnomuloj: Salih Ali — patro kaj Jaŝar Ali — ties filo. Unue la malliberigitoj, interkonsiliĝinte per sia gorgŝona kaj stranga lingvaĵo, petis la gardiston, kiu komprenis iom la tataran, transdoni ilian peton al la regionestro: la kaptitoj apartenas al la vilaĝoj ĉi-flanke de la limo kaj estas rusoj, kiuj estas senkulpaj, kaj eĉ ne sonĝis ribelon kaj neobeon; la regantoj ne devas ilin puni — nek ilin, nek iliajn parencojn kaj samvilaĝanojn. Al ĉi-ĉio la gardisto respondis per kolerega kaj silenta rigardo. Kaj poste, kiam lia oficiro demandis lin pri la stato de la malliberigitoj, li ĉion raportis. Vespere ankaŭ la adjutanto kuraĝis ekdubi antaŭ la generalo ilian kulpecon. La generalo kutime bonkora maljunulo, sagaca en kompanio de junaj inoj aŭ dum vesperbalo, gaja ĉe glaso da vino, silentema ĉe la ludtablo, — nur ridetis kaj patre riproĉetis la junan homon pro lia naiva pardonemo; kaj poste li diris: „Ruza popolo estas ĉi-hundoj. Ne ekzistas sur la tero pli satanaĵoj. Mi opinias ke ĝuste ili donis armilojn kaj ilin sendis trans la limon.“ Kaj drinkinte iom pli ĉi-foje kaj trovinte sin en bonhumoro, li verdiktis kaprican ordonon: Naŭ el la arestitoj oni mortpafu tuj morgaŭ, kaj la ceterajn kvar kiel ili estas en la nomaro, oni rekonduku al iliaj hejmoj. — Oni sciu, ke la rusoj ne emas ŝerci . . .

La arestitoj estis kuŝantaj sur la tero en siaj longaj anterioj*), tiel, kiel ili estis, kun ligitaj manoj. Aŭdinte tiun sciigon, kvankam ili ne povis atendi ion alian, ĉiuj ili konsterniĝis kaj per unu fojo ekparolis laŭte kaj incitite. Kaj inter ili estis fortikaj viroj,

*) Dika vestaĵo.

kiuj ekstremis pro timo, kaj junaj knaboj, kiuj voĉe ekploris. Maljunulo, kuŝanta kun la dorso sur la plafono, fermis siajn okulojn kaj mallaŭte ekpreĝis, apenaŭ movetante la senvivajn lipojn. La patro Ali, kun larĝa griza barbo kaj konvekso laringo, kun duonrazitaj lipharoj kaj kun kapuĉo ne ankoraŭ deprenita desur la kapo, malhele kaj silente sin apogis ĉe la malseketa muro kaj aŭskultis, kiel veis lia filo. Denove komenciĝis interparoloj, ankoraŭ pli ardaj kaj incititaj. Oni koleris kaj blasfemis. — Kial vi kverelas, pace la maljunulo diris, kaj kial vi timas la rusajn buĉistojn? La vivo apartenas al Dio, kaj nur unu fojon oni mortas... Kaj li ree fermis siajn okulojn kaj daŭre preĝis. Subite ĉiuj silentiĝis. Iu ekkantis larĝtonan kaj malĝojan kanton; la ceteraj kunkantis per la sama funebra tono: tio estis preĝo... Pasis noktomezo. Fariĝis tute sufoko en la malvasta katakombo. — Babá*), malfacile estas al mi! elbuŝigis la juna Ali, se estus akveto almenaŭ... Ne estas akvo, toleru iom! la patro diris. Estiĝis mistera silento... La endormiĝintaj ekdeliris: la sciigo pri la morto kaj la sufoka aero ilin febrigis. Nur la patro Ali kaj la maljunulo estis maldormantaj, la sonĝo ne ankoraŭ estis ferminta iliajn palpebrojn.

Frue antaŭ tagiĝo, deel la malgranda fendaĵo de la subterejo, ekbrilis flagranta lanterneto. Aŭdiĝis obtuzaj paŝoj, bruo de najlitaj botoj, knarado de pafiloj, kaj poste rapida, jen milda, jen nervoza respondo. La pordo grincis. — Stariĝu-u-u! alarme aŭdiĝis super la dormantoj. Ĉiuj konsterniĝis. La deĵoranto proksimiĝis la lanterneton al la nomaro de la naŭ kondamnitaj kaj komencis laŭtleĝi: Šaban... Ibrahim... La arestitoj stariĝis unu post la alia, pene sin apogante ĉe la tero per la kubutoj de siaj kunligitaj manoj. La ceteraj tremis pro timo. Oni elvokis ok personojn: restis ankoraŭ unu! — Ali... la soldato legis kaj eksilabis: Ja — ŝar! Jaŝar tamen ankoraŭ dormis. La maljuna Ali, apogite ĉe la angulo, subite ekstremis: li rigardis al sia filo, kiu sinforgese ronkis kun malfermita buŝo. Turmentite kuntiriĝis la trajtoj de la patro, li stariĝis, sin balancis, rektiĝis super la dormanto, kvazaŭ volante lin ŝirmi per sia larĝa anterio. La soldato tamen denove ripetis: Ali Jaŝar! La patro kunpremis la lipojn, ĉirkaŭrigardis kaj subite diris malmole kaj surde: „Jen mi!“ Kaj malrapide li direktiĝis al la grupo de la kondamnitaj. La filo daŭre dormis...

Pasis kvaronhoro. En la malvasta ĉelo, post la dumnokta alarmo kaj timo, ekestis momenta faciliĝo. La tri maldormantoj vigle ekinterparolis. Subite tre proksime en senorda salvo aŭdiĝis pafado; ĉiuj ekstremis kaj blekis, kiel bovoj, kiuj flaras sangon, kiam ili proksimiĝas al la buĉejo... Jaŝar vekigis kun forta ektimo. — Babá! Kie estas mia patro? — Alaĥ lin gardu, unu

*) Patro.

el la kamaradoj diris kaj profunde sopiris. Matene la soldatoj elkondukis el la subterejo la kvar malliberigitajn kaj trans la pinto de la monto, kunligitajn, ilin direktis al la malproksimaj kabanoj...

La eta Mary, kiu delonge ne plu ridis, sin turnis al la rakontanto: „Stranga historio! Kaj se ankaŭ al vi prezentiĝis simila okazo, kion vi estus farinta?”

— Ĉu mi? li demandis kaj levis la kapon, daŭrigante denove plenigi la pipon: Atendu iom... Mi tie en Rusio havas dujaran filon... Jes, jes! Al mi ŝajnas, ke ankaŭ mi ĝuste tiel estus aginta...

Trad. A. Grigorov

Hristo G. Kazanĝiev

En la stepo

Imperiestro Mihail sukcesis per la forto de la rego kaj la brilo de sia krono, silentigi la famon pri sia amo kun la belega fremdulino, sed la ido naskiĝis kaj kvazaŭ ĉi tiu etulo ekparolis pri tiuj sensaĝaj noktoj, kiujn li estis travivinta kun sia amatino.

Mihail sekrete vivis kun ŝi, fordonis la trankvilon de sia dormo por esti pli longtempe en ŝia domo. Kaj post ne longe ŝi naskis filinon, kiun ili nomis Evrosina. La imperiestro prenis sian naskitino kaj ŝin lasis en la domo de sia onklino, kiu promesis zorgi pri la vivo de la bela infaneto. Post kelka tempo la belega imperiestra amatino forkuris kaj baldaŭ Bizantio forgesis ŝian nomon. Kaj la infano kreskis kaj rememorigis al sia patro pri la bela pasinteco.

Kaj kiam la bulgara reĝido Joan Asen iris en Bizantion por studi tie li konatiĝis kun la bastarda filino de la imperiestro. Ĉi tio okazis dum festeno en la palacoj ĉe Piga, kie la juna bulgara princo estis invitita kaj kie lin ĉirkaŭis la estimo de ĉiuj altranguloj.

La grandaj nigraj okuloj de la juna knabino kelkfoje sin direktis al li — la malĝojaj rigardoj de turmentita animo. Antaŭ tiuj nigraj okuloj kiuj similis la okulojn de reĝa mumio, Joan Asen ektremis kaj kiam malfrue dum la nokto li enhejmiĝis, li longe pensis pri ili. Post kelkaj tagoj li denove ŝin vidis promenanta sur la belaspekta Malgrandazia bordo. Li ekparolis ŝin kaj ambaŭ daŭrigis sian vesperan promenadon. Kiam la suno fermis fajrajn okulojn kaj ĝiaj rigardoj malheliĝis en la orsanga maro, ili adiaŭis apud la grandaj urbaj pordegoj, kie ŝi, en la krepusko de la viola nokto, donis al li kelkajn iridtrunketojn.

Baldaŭ post tio en Bulgario Ivajlo komencis siajn militirojn, pri kiuj en Bizantio oni komencis paroli kaj Joan Asen estis devigita forveturi en sian patrujon.

Ili ne povis adiaŭi sin.

Nun je honoro de la forkurinto Joan Asen, je la ribelo de Ivajlo en Tirnovo, la tata hano Nogaj donis regalon en sia ten-

dar. Post longa gvidado tra la stepo, kie sur malselitaj virĉevaloj rajdis tataroj kaj nigraharaj gruzininoj, Joan Asen sidis sur multekosta sofo rigardante sian protektanton.

Kaj Nogaj estis kruela, severa estro de la tatara gento. Je lia ordono senkulpe multaj estis mortigitaj.

Antaŭ la festantoj, tra la enirejo de la granda tendo, videbliĝis la profundo de la stepa nokto. Eksilentiĝinte antaŭ la festeno, la stelplena ĉielo kunigis la horizontojn de la senarba ebenaĵo, sur kiu estis disĵetitaj kaj blankis en la mallumo la tendoj de la tatara bando. Antaŭ la enirejo mem de la ĥana tendo dancis sklavinoj de la haremo de Nogaj, ĉarmaj, beltaliaj virinoj, duonvestite, kun longaj, nigraj, kiel senfina vojo dumnokte, hararoj.

La ĉarmaj tremoj de la dancistinoj incitis al deziregoj kaj la okuloj de la ebriigitoj brulis pro la forto de la Korinta vino. Dekdu felsakojn de tiu vino la Bizantia imperiestro Mihail donacis al Nogaj, kiam romeoj alkondukis lian bastardan filinon Evrosina, kiel garantiaĵon porpacan kun Nogaj. Kaj nun ŝi plenigis per vino la oromitajn kornojn, enverŝis vinon al sia ordonanto kaj al lia gasto kaj eble, ŝi rememoris pri Bizantio, pri festenoj kaj amuzoj en la domo de sia patro.

— Diru, kiu lando vin naskis kaj ĉu virino estis via patrino kiu vin nutris kaj donis al vi sunon kaj vivon?

— Proksimiĝu, venu pli proksimen al la fremdulo, la gasto de via reganto, por ke lin ekblovetu la bonodoro de via korpo, de viaj haroj, nigre rezinaj kiel malluma nokto, surkovrinta la stepojn de via lando.

Kaj ne forigante de ŝi sian rigardon Joan Asen ne povis ekkoni en ŝia vizaĝo tiun kiu dum bela nokto donis al li iridon kaj per sia rigardo venkis tiam lian fieron kaj ravis lian koron.

Kaj dum la sama horo, kiam Joan Asen dormis jam en sia tendo, Nogaj fintrinkis sian glason kaj kiam ĝin forĵetis, ekiris al sia dormotendo. Kaj kiam li eliris eksteren, li vidis apud la tendo de Joan enrigardi tra la kurtenoj, Evrosina'n. Kaj kiel fulmo trapasis en lia animo penso.

A...?!
Kaj la ĵaluzo de la ekkoleriĝinta ĥano naskis venĝon.

Kaj Evrosina, aŭdinte ies paŝojn post si, ektimis kaj rapide malaperis malantaŭ la aliajn tendojn por kaŝi siajn postsignojn. Sed la rapideco de la ekkoleriĝinta Nogaj ŝin atingis kaj lia mano metiĝis sur ŝiajn ŝultrojn.

— Aŭdu! Diru al mi la veron! Ĉu kun li vi deziris finfesteni ĉi tiun nokton? Diru al mi, ĉu li deziris tion aŭ vi... vi mem ekdeziris kaj decidis eniri en lian tendon?

Mutiĝinte antaŭ lia krio ŝi lin rigardis kun larĝe malfermitaj okuloj kaj ne sciis kion respondi.

— Sciu, kiam en la profundo de la stepo ektagiĝos, ili estos morta. La sango de lia koro ruĝigos mian ponardon.

Kaj ie en la mallumo, kie gardantoj kaj estroj kun sangaj pro ebrieco okuloj sidis ĉirkaŭ brulantaj fajrujoj, Nogaj haltis kaj

ordonis ion al iu el ili. Kaj tiu ekrigardis sian ponardon, premis ĝin kaj poste aprobis kapsigne.

Evrosina rigidiĝis observante Nogaj'on. Kaj kiam ŝi vidis lin inter la gardantoj kaj divenis lian ordonon, ŝia frunto malheliĝis kaj en ŝi naskiĝis penso, ĉar la rememoro pri delonge forpasintaj tagoj ekparolis en ŝia animo kaj ŝia koro pli forte ekspiris je la ĥana gasto. Kaj ĉirkaŭvolvinte sian korpon per la viola togo, ŝi kaŝiĝis post la tendo kaj gardante sin por ne esti vidata de ies okuloj, ŝi rapide eniris ĉe Joan Asen. Kaj li, ankoraŭ ebria, dormis profunde kaj de lia malfacila spirado oni komprenis, ke li sonĵas ion malbonan.

— Joan! Joan!

La sentrona bulgara reĝo dormeme malfermis la okulojn kaj rigardis al Evrosina, tiel mistera, nekonebla en la mallumo, staranta antaŭ lia lito kiel fantomo, kaj nur la enpenetranta lunlumo diferencigis ŝian korpon.

Li ektimis, volis ekkrii, sed la rapida ekparolo de la virino lin rekonsciigis kaj li, kiel somnabulo vekiganta ĉe la bordo de malluma lago, ankoraŭ povis nenion kompreni.

— Estas mensogo!

— Aŭskultu, kedu al mi. Venu kun mi eksteren. Tie vi ĉion ekscios.

• • • • •
Du ombroj trarampis sur la vojeto kaj malaperis en la altkreskan herbajon de la stepo.

— Aŭskultu, mi alkondukos al vi tuj ĉevalon. Savu vin, ĉar mi diris al vi, la suno vin morta lumigus. Viajn postsignojn mi kaj miaj fratinoj kaŝos. Joan, rekonsciiĝu, kedu al mi.

— Kiu vi estas kaj kiu donis al vi tiun koron?

— Joan, en Bizantio vi ekamis ies nigrajn okulojn — ekrigardu ilin — ĉu ili postlasis tiam nenion en via animo, ĉu vi ne konservis almenaŭ unu penson pri ili ĉe la maro?

— Evrosina?!

— Rapidu, rapidu ĝis kiam la luno ne estas ankoraŭ montrinta sian vizaĝon sur la stepo.

Ŝi ensorbis siajn lipojn en la liajn, delasis la kapon sur lia brusto kaj kiam rekonsciiĝis, disiĝis de liaj fortaj brakoj kaj rapide malaperis en la mallumon kun plorego kaj ĉagreno.

Rajdanto galopis tra la stepo kaj en furioza kuro malvidebliĝis por la rigardoj de la Nogaja loĝantaro.

Kaj la homoj en la tendoj dormis kaj nenies okulo rigardis al la malproksimo.

Kaj dum la tagiĝo granda mortiga ŝtiparo eklumis inter la tendoj, kurbigis fajrajn manojn al la lazura ĉielo kaj meze de la krakanta en la flamoj lignaĵo ies virina voĉo ploregis kaj ripetis kelkfoje:

— Joan! Joan! Traj. G e o V.

Unu sugesto

La rapida disvendo de esperantaj lernolibroj kaj ilia kelkfoja eldonado certigas nin, ke la internacia lingvo interesigis grandan parton de la kultura bulgara socio, dank al la energio kaj fervoro de veraj samideanoj, kiuj ne avaris tempon kaj monon por la efektivigo de sia idealo.

Mian honoron al ili!

Sed konsternigas min la fakto: komence estas multaj esperantanoj, sed ĝisfine tre malgranda parto de ili estas esperantistoj.

Kiu estas kulpa?

La ĉefaj kaŭzoj estas du: la lernolibro kaj la instruisto. Pri la lasta tre trafe skribis Mimoso en sia artikolo „Instrumetodo de Esperanto“.*) Pro tio mi forlasos ĝin kaj parolos pri la unua.

Kvankam la lernolibroj estas tre bonaj kaj detalaj por ellerno de Esperanto, ili tamen ne estas taŭgaj por ĉiuj. Pro tio mi proponas la eldonon de lernilo „Esperanta amiko“. Por elmontri la simplecon, la flekseblon kaj la belsonecon de Esperanto, miaj sugestoj pri la aspekto de la libreto kaj pri la ordigo de la lernmaterialo estas la jenaj:

1) La formo de „Esperanta amiko“ estu taŭga por enpensiĝo, por ke la lernanto povu ĉiumomente enketi ian ellernitaĵon.

2) La literoj estu maldikaj (malgrandaj). Tiel ĝi estos pli malgranda kaj atentigos multajn neesperantistojn pri la facileco de nia lingvo.

3) En ĝia antaŭparolo estu notitaj koncize la avantaĝoj de Esperanto (vortkonstruo, internacieco de la lingvo, la ĝisnunaj akiraĵoj en la regiono de la literaturo — originala kaj traduka — ktp.).

4) Sufiĉaj estas 12 mallongaj lecionoj, ĉiu aparte havanta konvenan vortareton kaj laŭekzercan gramatikon. Estu evitataj malofte uzataj afiksoj kiel -aci, -ator, -estr, fi-, -io, -iz, -oid, -oz, pra-, mis- k. s. Ili nur ŝarĝas la menson de la komencanto kaj malesperigas lin.

5) Por legaĵoj estu donitaj mallongaj interparoloj el la ĉiutagaj vivbezonoj, tradukitaj bulgare (maldekstre esperante, dekstre tradukite, sur la sama folio). Per tiu maniero oni lernos kaj uzos eĉ frazojn de lecionoj, kiujn ankoraŭ oni ne atingis.

6) Por krestomatiaj sufiĉas 3—4 mallongaj leteroj, ankaŭ paralele tradukitaj bulgare. Tiel ili servos al la komencantoj por interkorespondi kun alilandanoj kaj la praktiko interesigos ilin pri Esperanto.

*) En la ĵurnalo bulgarlingva „Esperanto“, Sofia, 1926.

7) Ĉe la fino estu metita „aldono“, en kiu estu notitaj ne enpresitaj en la lecionoj afiksoj, kun la necesaj klarigoj. Bonaj estus kelkaj gramatikaj detaloj (ekzemple: kio estas substantivo, adjektivo, adverbo k. a.).

Tiamaniere pri la lernolibro interesiĝos tiel la sperta esperantisto, kiel ankaŭ la komencanto, kiuj ĉiumomente povos ekzameni sian scion.

Proponante la „Esperantan amikon“, mi invitas ĉiujn samideanojn lumigi ĝin de multaj flankoj kaj fine kune, per ĉiuj fortoj, ni eldonu la plej maldikan, praktikan lernolibreton, kiu estu por la lernolibroj la samo, kio estas la Ĉefeĉa ŝlosilo por la vortatoj.

Pleven

Dim. Borisov

Inter ni

Kiel ĉiu movado, tiel ankaŭ la esperanta, paralele al la senĉesa evoluo konstante ricevas ĉiam pli kaj pli novajn taskojn, aŭ, pli vere, la ĝeneralaj taskoj, kiujn ĝi havis en sia komenco, detaliĝas kaj specialiĝas.

Bedaŭrinde la esperantistoj — kaj precipe tiuj, kiuj gvidas la movadon kaj ĝiajn erojn — ne ĉiam sekvas tiun evoluon de la taskoj kaj ne ĉiam konformigas sian agadon al la postuloj de la travivata momento.

Pro tio, multa energio kaj laboro estas dediĉataj al vanaj klopodoj.

Organizita movado — tio ĉi signifas: per minimumo da fortostreĉo ricevi maksimumon da rezultoj. La ideo pri organizo estas ĉiam ligita kun la ideo pri racia kaj ekonomia uzo de la tortoj.

Kiun taskon ni povas meti al la esperantista movado nun — en la momento, kiam ĝi jam forpasis la malfacilegan unuan periodon de populariĝo de sia propra nomo, kiam ĝi kreis sian adeptaron, kiam ĝi sukcesis pli-malpli trudi al la mondo la konscion kaj la rekonon de sia ekzisto, kiam fine en certaj medioj oni havas eĉ pli grandan iluzion pri la stato de la movado ol ĝi eble estas?

De multaj flankoj oni respondos senhezite: propagandi, senĉese propagandi, ĉiam kaj ĉie propagandi.

Propagandi — tio estas varbi ĉiam novajn adeptojn kaj plimultigi la esperantistaron, — enirigi ĉiam pli multajn homojn en la esperantistan vivon.

Sed ĉu tiu ĉi vivo mem estas jam definitive kreita, formita? Ĉu por tiuj homoj, kiujn oni klopodas varbi, ekzistas jam preta, riĉa, diversflanka vivo per Esperanto?

Mi respondas: ankoraŭ ne tute; ni ankoraŭ devas labori por krei tian vivon.

Kaj jen, tiu ĉi tasko estas en la nuna momento senkompare pli grava en nia movado, ol propagandi.

Sencele estas instrui Esperanton al persono, kiu post la kurso ne vivos esperantiste. La tuta klopodo estas nur vane

uzita laboro. Tio ĉi estas plena kontraŭo al la fundamenta ideo pri organizo kiel ekonomia uzo de fortoj por atingi definitan celon.

Sed kelkaj opinias, ke sufiĉe estas, se la kursanoj eniras post la lernado en la kurso la organizaĵon. Se la organizaĵo efektive prezentus esperantistan vivon, — jes, tiu opinio estus pravigata. Sed kion ni donas en la organizaĵo ordinare al la freŝaj esperantistoj? Ni kvazaŭ penas konvinki ilin, ke ili devas preni parton en la formalaj organizaj demandoj — ja ili pagas per sia kotizaĵo sian rajton en tiu rilato! — kaj ĉe tio, por forigi ilian naturan kaj pravan ĝenatecon partopreni aktive en la vivo de organizaĵo, kie ili ankoraŭ estas novicoj — ni penas konvinki ilin, ke la cenzo pri posedo de la lingvo estas duaranga laŭ graveco . . .

Ĝis tia paradokso, malfeliĉe, ni jam venis en Sofio — eble eĉ en multaj lokoj de nia lando.

Oni ĝojas pro la „amasa movado“, ne rimarkante la negativan flankon de tiu movado.

Kaj jen, kontraŭ tiuj komprenoj pri la movado kaj kontraŭ tiuj vokoj pri senĉesa vasta propagando, vokoj venantaj ordinare de pli novaĵ kaj pli malpaciencaj esperantistoj, el Ĝenevo venas al ni serioza, aŭtoritata direktanta voko: „Ne kuru tro rapide, por ke la spaco inter la famo kaj la fakto ne fariĝu distanco... Ni devas varbi per kursoj ne kun 50 lernantoj en komenco kaj 5 en fino, sed seriozaj, ĝisfundaj, kun 10 personoj, eĉ kun 6 aŭ 7 de l'unua ĝis la lasta leciono, ke ĉiuj povu lerni per ekzerco kaj parolo“.

Certe, tiun vokon la trorapidemaj kaj malpaciencaj propaganduloj, revantaj pri grandamasa movado kun bruo, renkontos kun konfuzo. Ili ne komprenos ĝin.

Kaj tamen — ĝi estas la sole obeinda konsilo. Ĝi respondas al la neceso de la nuna momento, kaj precipe en nia lando.

Antaŭ ni aperas la grava demando: al kio direkti niajn klopodojn — al kvanta, aŭ al kvalita progreso?

Kompreneble, la kvanto, ligita kun la kvalito estas granda forto kaj estos de ĉiuj dezirata. Sed, kiam ekzistas nur la kvanto kaj por ĝi oni oferas la kvaliton — tiam la kvanto jam povas esti rekte malutila. Ĝi jam signos la malforton de la movado.

Tiun penson certe ankaŭ ne povos asimili la malpaciencaj propaganduloj.

Kaj ja frapantaj ekzemploj ne mankas — ili estas antaŭ niaj okuloj.

Ĉu vi scias ke dum la lastaj 5 jaroj ne malpli ol 500 personoj estas vizitintaj la esperantajn kursojn en Sofia? Kie estas nun la esperantista vivo, rezulte de tiu laboro? Ĉu ni ne havus nun multe pli grandan forton, se post unu kurso ni dediĉus nian plenan atenton al la tasko finesperantigi la novajn, freŝajn samideanojn, kreante por ili veran esperantistan vivon? — Sed, ni ĉiam post la fino de ĉiu kurso pensis jam pri novaj varboj de novaj personoj — por plimulti la amason de la duonesperantistoj. Kaj por vivi esperantiste — al ni neniam restis sufiĉa tempo.

Ĉu nun oni povus trovi en niaj organizaĵoj esperantistan vivon? — Se iu nova esperantisto dezirus trovi lokon, kie li aŭdos esperantan konversacion, kie li renkontos homojn, parolantaj pri la aferoj, kiuj interesas la tutmondan esperantistaron, se li dezirus trovi sin en vere esperantista medio — ĉu tiun lokon li trovos en la organizaĵoj esperantistaj de nia urbo?

Cetre ne.

Kie do estas la fruktoj de nia ĝisnuna laborado?

Nun al niaj organizaĵoj donas fizionomion la duonesperantistoj; ili donas la tonon en niaj kunvenoj. Por altiri amason, oni jam oferis Esperanton — oni elĵetis la esperantan parolon el la esperantistaj kunvenoj. Oni enkondukis iajn bulgarlingvajn referaĵojn. Prezentu nun al vi, ke serioza homo ellernis Esperanton, al li ekplaĉis la aspekto pri bela samideana vivo, kaj li iras al esperantista kunveno, por trovi ĝin. Li venas en la kunvenejon de la esperantistoj. Kion li trovas? — Ju homo legas en bulgara lingvo pri ia temo, kiu havas nenion komunan kun Esperanto kaj kun la esperantista vivo. — Kaj li ekpensas: kie do mi estas? Kie mi devos serĉi esperantistan vivon, esperantistajn interesojn, se ne ĉi tie?

Kaj prezentu al vi, ke fremdlanda esperantisto venus Sofion kaj dezirus surprize viziti kunvenon de la lokaj samideanoj. Kion li trovos tie?

Tempo estas jam, ke ni iom flankenlasu la eksteran propagandon kaj ekpensu pli serioze pri la kreo kaj organizo de la esperantista vivo. Tia vivo estas kreebla nur, se ekzistus bonaj, perfektaj esperantistoj, kaj do la unua ŝtupo al tiu vivo estas labori por la perfektigo de la nunaj duonesperantistoj.

Kaj oni devas scii: En la nuna tempo la organizita bone, formita esperantista vivo povas esti multe pli efika propagandilo ol multaj kaj multaj teorioj pri la internacia lingvo.

A d a

Enlanda Esperanto-movado

Post la propaganda semajro, pri kies bonrezultoj ni koncize raportis en N-ro 4 de la revuo, la movado bonege prosperas. La intelektuala vivo de la grupoj vigliĝis, ankaŭ la publika propagando ne ĉesis. Jene ni donas raporton pri tiu vivo lastatempa.

— Sofia. Fondita nova grupo laborista. Kurso en la klubo de la sendependaj lab. sindikatoj. 2 kursoj ĉe la Profesia knabina lernejo — entute 72 partoprenantoj. Kurso ĉe la Teknika lernejo (arbarista fako) — 22 p. Kurso urbana por perfektigo — 40 p. 2 kursoj ĉe la Mekano-teknika lernejo — entute 80 p.

Literatura Zamenhova vespero. Kelke da amuzvesperoj. La esperanta teatraĵo „Solecaj animoj“ de Homunculus prezentita kun granda sukceso. En la diversaj E.-organizaĵoj okazis multnombraj

referaĵoj: Cv. Cvetkov — Pri la Esperanta sento; La espero kaj la vivo; La bulgara literaturo en Esperanto. St. Venkov — En la sanktlando de l'silento. Zvezdin — Esperanto kiel lingvo internacia. Martha Root (amerika ĵurnalistino) — Bahajismo. Tiu referaĵo estas speciale menciinda. Ĝi okazis en la Universitato antaŭ granda publiko kaj estis tradukata nacilingven. L. Mladenov — Konsideroj pri la sporto. P. Dimitrov — La reciproka interhelpo. Iv. Dimitrov — La interhepilo. Zah. Zahariev — Historio de la E.-movado, k. m. a.

- Radomir. Ekspozo, referaĵo.
- Stara Zagora. Kursoj: urbana — 30 p.; lernanta — 20 p. Du referaĵoj. Por la Pasko oni preparas ekspozon.
- Plovdiv. Loterio, kies profito utiligota por „Esp.-biblioteko en Plovdiv“. Preparata E.-konferenco de Suda Bulgario. Adr.: Ivan Ĝarov, kvartalo „Malak Pariĵ“.
- v. Borisovo. (Popova reg.). Kurso.
- Pleven. Vesperfesto. Kurso por turkoj. 2-a Distrikta E.-konferenco.
- v. Peternica (Plevena reg.). Fondita nova grupo — 14 p.
- v. Teliŝ (Plevena reg.) 2 referaĵoj.
- v. Golemoselo (Kazanlika reg.). Kurso por perfektigo.
- Vidin. Amuzvespero.
- v. Novo-Selo (Vidina reg.). Kurso — 25 p.
- v. Vrabevo (Trojana reg.). Fondita nova grupo.
- T. Pazarĝik. E.-ekpozo, amuzvespero. Kurso — 16 p.
- v. Golemo Jalare (Tirnova reg.). Fondita nova grupo. Kurso.
- Tirnovo. Distrikta E.-konferenco. La grupo havas propran kordinstrumentan orkestron de 15 p. Kurso por lernantinoj — 25 p.
- v. Kermenli (Slivena reg.). Kurso — 15 p.
- v. Toros (Lukovita reg.). Fondita nova grupo. Kurso — 31 p.
- Burgas. La grupo estas renovigita.
- v. Lovni-dol (Sevlieva reg.). Kurso — 18 p.
- v. Kostandovo. Ludita estas la teatraĵo „Sub la nova jugo“. 2 referaĵoj.
- Jambol. Solena malfermo de E.-klubo
- Sumen. Fondita nova grupo de lernantoj. Kurso.
- Gara Kaspiĉan. Fondita nova grupo.
- Gara Lesiĉeri. Grupo, E.-biblioteko.
- v. Nasĉi (Eski-Ĝumaja reg.). Kurso — 16 p. Kurso por perfektigo — 10 p.
- v. Pravec. Klubo, E.-biblioteko.
- v. Beglej (Plevena reg.). Fondita nova grupo — 15 p. Kurso.
- v. Sadovec. Klubo — 42 p. Estas preparata 3-a E.-Konferenco Distrikta.

Redakcia Komitato:

Asen Grigorov — Zahari Zahariev

Esperantista Junularo, Jan. Marto 1926.
 Esperanto — mondo. Nova gazeto, celanta la disvastigon de homamajn idealojn kaj de la japana sekto religia „Oomoto“. Redaktoro: K. Nišimura.
 Espero Teozofia, Okt., Nov., Dec. 1925.
 La Ora Epoko, Okt., Nov., Dec. 1925.
 Arbeiter — Esperantisten (La laborista esperantisto), Nov., Dec., 1925.
 Brazila Esperantisto, Okt., Nov., Dec. 1925.
 Marto, Febr.
 La Suda kruco, Nov., Dec. 1925, Jan. 1926.
 Belga Esperantisto, Okt., Nov., Dec.
 Portugal — Esperanto, Jan., Febr., 1926. Nova propaganda gazeto.
 La Movado, Marto.
 Holanda Esperanto-Pioniro, Julio, Aŭg., Sept, Nov, Dec. 1925. Nova gazeto por la propagando de Esperanto en Holando.
 Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio, Jan., Febr. Sciigate estas, ke la Estona Klerministerio donis al la „Informoj“ subvencion de 12.000 mk. Ĝi estas redaktata nur en Esperanto kaj tre leginda.
 Konkordo, Jan., Febr.
 Litova Stelo, Jan., Febr. La nepolitika fako de tiu gazeto — la fako literatura — estas bona. La lasta numero enhavas belajn versaĵojn.
 Pola Esperantisto, Sept, Okt., Nov., Dec. 1925., Jan., Febr., Marto 1926. Denove aperas.
 La Progreso, Sept. 1925.
 Laborista kulturo, Marto 1926, Budapest. Hungarlingva gazeto kun esperanta fako.
 Ново Човѣчество, Novembro, Decembro 1925, Januaro 1926. Sofia, Bulgarlingva.
 Helios, Marto, 1926. Valencia. Hispanlingva.
 Житно Зърно, Nov., Dec. 1925, Jan., Febr. 1926., Sofia. Bulgarlingva.
 Kosmopolit, № 4. Leipzig. Germanlingva kun E.-fako.
 Свѣтулка, № № 4 kaj 5. Sofia. Bulgarlingva.
 Revista del Ateneo, Dec. 1925, Jerez de la Frontera. Hispanlingva kun E.-fako.
 Комедия, № № 66, 69, 70, 72, Sofia, 1926. Bulgarlingva.
 Eugenia, Jan., Febr. 1926, Barcelona. Hispanlingva.
 Копнежи, № № 1, 2, 3, 1926. Sofia. Bulgarlingva. — Tiu nova gazeto literatura, konstante pliboniĝanta, iniciatas — sola inter la bulgaraĵ revuoj — Esperantlingvan fakon. Ĝis nun la donita materialo, versaĵoj de la redaktoro Al. Perun, mem nova, sed fervora samideano, estas nekontentiga, precipe lingve malkorekta. Tio estus pravigebla per la cirkonstanco, ke mankis pli sperta kunlaboranto. Sed, laŭ promeso, estonte la „Esperanta paĝo“ de tiu alie simpatia revuo estos zorge redaktata.

BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

STR. CAR BORIS, 69 — SOFIO

Liveras:

Praktika gramatiko de internacia lingvo Esperanto	3.—	„
Ĉu estas ebla kaj necesa helpa i. l. (prof. Ŝiŝmanov) bulgarlingva	3.—	„
„Esperanto“ (prof. Ŝiŝmanov) propaganda broŝureto bulgarlingva	2.—	„
Paroladoj de Zamenhof (apartaj kajeroj I—V) bulgarl. po Internacia Konferenco por komuna komerca lingvo (Venezia) bulgarlingva	2.—	„
Esperanto-bulgara vortaro (Har. Bačvarov) bindita	5.—	„
„ „ „ „ „ „ nebindita	50.—	„
„ „ „ „ „ „ „ „ „	35.—	„
Ŝlosilo de esperanto	4.—	„
Esperanto-bulgara frazaro	8.—	„
Albumo de Bulgaraj esperantistoj (eld. 1923)	25, 35.—	„
Rememoroj de esperantisto (Ada)	20.—	„
Bulgara Antologio (lv. Krestanov).	100.—	„
Ŝercoj kaj incitoj (200 ludkartoj kun demandoj kaj resp.)	60.—	„
Apartaj numeroj de gazeto „Bulgara esperantisto“		
jaro II, III, IV, kaj V	1.50	„
jaro VI	2.50	„
Insignoj, propagandaj kovertoj, poŝtkartoj, portreto de Zamenhof. por poŝtelspezoj oni aldonu: en Bulgario 15%, en aliaj landoj 30%.		

Adreso de la administrejo: strato „Car Boris“, № 69,
Sofia (Bulgario).